


AMERIKA ESPERANTISTO

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



*Excerpts from "Danio"
New Danish Book*


*Esperanto in Action
News of Members*

*The EANA Honor Roll
for 1959 - 1960*

*La Kanto pri Hiavata
Kanto III & IV*

3

1960



AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

Official publication of the

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

114 West 16 St., New York 11, N. Y.

Central Office: Doris T. Connor, George Alan Connor, Myron R. Mychajliw

Sustaining Board: Ralph H. Beard, Dr. Luella K. Beecher, A. M. Brya, C. Cummingsmith, Dr. Lee-Min Han, Austin Herschel, Anonymous, Allan Hutcheon, J. Archie Johnson Jr., Paul J. Kovar, Bertha E. Mullin, Anonymous, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan.

Note Concerning Delay in the Issuance of A. E. And a Word about Renewal Premiums for Year 1961

We wish to announce that recent unfortunate delays in the issuance of AE and in general correspondence was due to vacation and family matters requiring the attention of Mr. and Mrs. Connor in the West. Then, to make matters worse, just as we thought we were back to work on the magazine and EANA business, we received word of the death of Mr. Connor's brother in Montana, necessitating our return to the West. We trust that our members will understand our difficulties and our loss, and will pardon these delays. We are now back to full active work for EANA and hope to "catch up" soon on all labors at the Central Office.

Concerning payment of dues for the year 1961, we wish to request early RENEWAL from our members and readers. As PREMIUM for such renewal we continue to offer either a FREE copy of the new cloth-bound "*Esperanto: The World Interlanguage*," or (if you already have the book) other books to the amount of \$2.00 at list prices. We shall publish soon a good list of other books, some never before listed, from which those who join or renew now may choose FREE books as PREMIUM FOR MEMBERSHIP. In the meantime, if you do not wish the free manual "*Esperanto: The World Interlanguage*," \$2.00 from your dues will be credited to your account for selection of other books. Send your renewal early.

Sur la kovrilo: La bela marvirineto en la haveno de Kopenhago, Danlando.

"The Association will not knowingly admit as members persons who are Communists or Fascists or others who seek to overthrow the Government of, or in the interests of a foreign power seek to weaken, the United States, or to change its form of government by other than constitutional means." – EANA Constitution.

Subscriptions in the United States and Canada: \$3.00 per year.

Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.

Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA – \$5.00 per year. Patron – \$10.00.

H. S. or College Student & Armed Forces – \$3.00 per year.

Sustaining Board – \$3.00 or more per month.

AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 73

OKTOBRO 1960

N-ro 3

DANIO – Kie abundo estas malofta kaj manko pli malofta. . .



H. C. Andersen

Infanoj en la tuta mondo konas la fabelojn de H. C. Andersen, kaj maristojn de ĉiuj nacioj bonvenigis kaj adiaŭis la marvirineto de la fabelo, kies gracia bronza statuo gardas la enirejon al la kopenhaga haveno. Jena libreto estas saluto de tiu Danio, kiu estis la patrio de la granda fabel-poeto, kaj kiu etendiĝas jarmilaĝa kaj eterne juna malantaŭ la fama vidaĵo de la Langelinie-promenejo.



– kaj la marvirineto

■ La danoj ŝatas rakonti, ke eksterlandanoj miksas la lokojn en la skandinaviaj landoj, ke ili ekz. kredas Tivoli la sveda ĉefurbo kaj alimaniere strange miskomprenas.

Danoj, norvegoj, svedoj kaj finlandanoj ne estas senkulpaj pri tio, ĉar ili faras ĉion eblan por proksimiĝi al la frataj nacioj. Kion jen danaj reĝoj aŭ speciale lerta reĝino, jen svedaj soldataj reĝoj klopodis akiri, la unuigon de Skandinavio, tion oni nun en ĉiuj skandinavaj landoj alstrebas, kaj bone estas, ke tiuj klopodoj plene evoluis nur post kiam ĉiuj kvin skandinavaj landoj (ĉar al ili ni ankaŭ kalkulas Islandon) fariĝis tute suverenaĵoj. Nun renkontiĝas ministroj kaj politikistoj de ĉiuj partioj minimume unufoje jare por provi kunordigi leĝofaradon kaj aliajn aranĝojn, tiel

ke tiuj landoj ĉiam kunlaboras kaj neniam kontraŭas unu la aliajn.

Post la lasta milito la skandinava kunlaborado manifestiĝis en multaj pozitivaj aranĝoj, kiuj plifortigis la solidarecon inter la kvin landoj. Inter la landoj oni ne plu postulas pasporton, kaj eksterlandano, kiu venas al iu limo de Skandinavio, montras sian pasporton kaj poste pluvojaĝas al la aliaj landoj; neniu demandas lin, de kie li venas. Li vojaĝas kiel en unu lando.

La loĝantoj de Skandinavio sentas la komunecon en diversaj, praktikaj kampoj. Ili egalrajte povas labori, kie en Skandinavio ili volas, oni faris ampleksajn interkonsentojn pri reciproka utiligo de la socialaj servoj, la dano povas uzi la svedan malsan-asekuron, kaj la svedo aŭ norvego povas ricevi maljunulpension en Danio. Oni



La luroj (blowinstrumentoj) de la bronza epoko ankoraŭ estas uzeblaj.



Antaŭ dumil jaroj jena ferepoka kamparano estis mallekata en la marĉon de Tollund en Jutlando, aŭ kiel kondamnito aŭ kiel ofero al la dioj. La glavo estas de la sama epoko, la Thor-martelo estas malpli aĝa. La vikingo insistis pri sia kredo portante ĝin, kontraste al la kristana krucio. La lerte farita fandujo de la forĝisto kontentigis klientojn de ambaŭ religioj.

povas elekti tiun universitaton en Skandinavio, kies instruadon oni opinias la plej bona, kaj ĉiujare la politikistoj de Skandinavio provas fari novan paŝon al pli granda kuneco, tamen ĉiam kun la plej profunda respekto al la netuŝebla sendependeco de la unuopa lando.

■ La kvin landoj estas tre diversaj kaj ĉiuj montriĉaj kaj grandegaj laŭ areo escepte de la malgranda Danio. La aliaj landoj havas sovaĝeĵojn kaj tial grandajn rezervajn areojn. En nia malgranda lando ni prenis sub kulturon preskaŭ ĉiujn lokojn.


Ne estas hazardo, ke la pradanoj nomis sian landon la »kampo de la danoj« (danernes mark, poste: Danmark), ĉar

la kampo laŭ ni estas malgranda, bone kulturita kaj bone zorgita terpeco. La nomo ĝuste diras, ke la lando ne estas granda, ne estas impona, sed modesta.

Ĝi estas lando de kamparanoj. La etkamparana animo estas la precipa. Ĝi estis lando de grandaj ideoj, sed nun ĝi estas lando de meza burĝeco kun solideco kaj konstanteco.

■ Monotona ŝajnas la lando de la danoj. Ondaj, verdaj kampoj kiel mozaiko, terpintoj kaj duoninsuletoj kun arbaroj kaj arbaretoj, kiuj speguliĝas en trankvilaj lagoj kaj profundaj, torditaj fjordoj. La ĉeflando Jutlando por la granda mondo estas nur modesta duoninsuleto, kiu supreniĝas kaj dividas

La ekspedicioj de la vikingoj komenciĝis kiel piratadoj kaj finiĝis kiel grandaj militadoj kaj invadoj, markomercado kaj elmigrado. La lastjaraj elfosadoj de iliaj kampejoj – ĉi tie (en miniatura kopio) Trelleborg ĉe Slagelse – donas frapan ateston pri la severa milita organizo de tiu tempo.



Nordan Maron kaj Baltikan Maron, sed oriente de tiu duoninsuleto kaŝiĝas amaso da grandaj kaj malgrandaj insuloj; estas kvincent, kaj ĉiu insulo, kiu estas sufiĉe granda por povi nutri familion, ordinare estas loĝata. Ŝipoj kaj linioboatoj kunligas la insulojn kaj la kontinenton, pontoj estas konstruitaj super tiel grandaj marregionoj kiel Lillebælt kaj la markolo inter Selando kaj Falster. Tiuj pontoj estas monumentoj pri dana teknika scio. Inter la ekstremajoj de la lando ekzistas neniu



Ĉe la preĝejo en Jelling staras du ruĝstonoj. La marĝeo Gorm la Maljuna metis unu kiel monumenton pri sia edzino, kaj la filo Harald Bludento metis la alian por memori pri siaj gepatroj, «Tiu Harald, kiu konkeris tutan Danion kaj Norvegiĝon kaj kristanigis la danojn».

dano, kiu de sia hejmo havas pli ol duoncenton da kilometroj al la plej proksima marbordo.

Sed malgraŭ tio la lando estas riĉa je kontrastoj. Venu al ĝi de okcidento, kie dungalono de sablomontetoj etendiĝas de sudo ĝis nordo kaj estas unika somerrestadejo. Tamen dezerto, jes, sed diligentaj manoj plantis pajlon post pajlo de sabla elimo kun la forta radikaro, kiu retenas la sablon, kie ĝi ne estas ligita de plantitaj arbaroj de pinoj kaj abioj.

Malantaŭ la dunoj la lando estas ebena. Tie antaŭe ekzistis la erikejo okupanta mezan kaj okcidentan Jutlandon. Nun preskaŭ ĉio estas kulturita. Tie kaj tie estas grandaj distancoj inter la fumtubo, sed multa nekulturita tero ne restas, kaj baldaŭ la danoj devos sekvi la ekzemplon de la nederlandanoj kaj konkeri teron de fjordoj kaj lagoj.

En la koro de Jutlando la lando forte leviĝas kaj malleviĝas. Belaj lagoj kaj krutaj montetoj igas la jutlandanon paroli pri montoj; la «Ĉielmonto», pli modestan nomon li ne povas trovi por la arbarkovrita monteto ĉe la lago de Juul.

Ni presas kvar paĝojn el bela 32-paĝa nova turista libro pri Danlando (Danio). Ni presas ĝin kiel ekzemplon de plej bonaj ilustritaj libretoj nuntempe presataj en Esperanto per diversaj registaraj instancoj tra la mondo. Tiuj membroj, kiuj deziras ekzemplon de la tuta libreto, sendu 10¢ por pakado kaj poŝtkosto al "Amerika Esperantisto." Sendu 25¢ kaj ni inkluzivos kelkajn diversajn aliajn turistfaldajojn.

ESPERANTO IN ACTION

Dr. Lee Min Han, member of the Sustaining Board of EANA, continues to make history for Esperanto in Africa and the Near East. Dr. Han is Dean of the Public Health College in Gondar, Ethiopia. He finds time for directing the *Gondar Esperanto Club* which meets in his home every Friday evening. His efforts for Esperanto have been so successful that there is now another group in the capital city of Ethiopia, namely the *Addis Ababa Esperanto Club*. And one of his enthusiastic students now in Lebanon, **Mr. Zemene Kassa**, has recently organized the *Lebanese Esperanto Association* in Beirut, closely associated with the American University in that city. Letters, articles and photographs from Dr. Han's students in the Near East attest to the solid success of his promotion for Esperanto. See reports of Dr. Han's activities in Apr-May 1959 & Mar. 1960 *AE Bulletins*.

Edgar Mason, Spokane, Wash., has started an Esperanto class this Fall in Spokane. Among the devices for instruction are playlets in Esperanto.

Mrs. Llewella Dowgiallo, Los Angeles, finds much interest in Esperanto among listeners of radio station KFI, known as "Night Owls" and organized into "Roosts". **Mrs. Dowgiallo** and **Mrs. Narita Monhollan** are members of the same "Roost". They plan to secure other members for EANA.

The Arts of Denmark -- In connection with the publication in this issue of excerpts from the Danish folder in Esperanto, it may be of interest to point out that a unique exhibition of Danish art is being shown at the Metropolitan Museum of Art up to January 8th, 1961. King Frederik IX and Queen Ingrid of Denmark personally opened the exhibit on October 14th.

La EANJ Skizeto, organ of the Esperanto Association of New Jersey, regularly publishes reports of their interesting meetings each month in the Orange YMCA. The meetings began on October 7th with Stanley Otto's account of the International Esperanto Congress in Brussels which he attended. Stan is also head of the Esperantist Boy Scouts in America. Members reported on their summer activities all over the country.

Mr. & Mrs. John Hoyle, Ontario, Canada, continue to mark up many successes in the promotion of Esperanto. Clippings from papers attest to good promotion. Speeches on Esperanto are given before groups: Presbyterian Ladies Aid, Imperial Order of Daughters of the Empire, and others. **Mrs. Hoyle** has donated Esperanto materials to the Sarnia, Ont., Public Library.

Donald Dayton, Wilmore, Ky., had an excellent letter to the editor, under "Reader's Views", in *The Enquirer*, and another in the *Lexington Leader*. He bases his letters on EANA's "Model Letters to the Editor."

Puerto Rican Esperantists are growing in numbers and in activity in the Esperanto movement. **J. Henry Kruse, Jr.**, head of the national organization of blind Esperantists, sends word that the Hadley School for the Blind in Winnetka, Ill., has employed **Miss Claudette Toro** of San Germán, P.R., (herself blind), to teach the school's Esperanto Braille course. Other active members of EANA in P.R. are: **Miss Sara Hebé Lugo**, San Germán, student in Central University, who puts articles in Spanish in the university's paper, and is organizing for a group. **Miss Ellen Lewis**, Condado, who did similar work for Esperanto in her school. **Miss Irma E. Báez**, San Germán, a new member. **Gordon Thompson**, San Juan, who is organizing a group. And **Dr. Mario A. Agrait-Marty**, San Germán, an expert and experienced Esperantist who serves as adviser and leader to all in Puerto Rico.

Esperanto Club of Springfield, Mass., meetings are held in the home of Mr. & Mrs. Frank P. Hayden. New Esperanto classes are scheduled for the area in and around Springfield and Greenfield. Mr. Warren H. Gould, leader in the group, reports much class and club activity, including a good course in Evening High School, with new successes everywhere.

It is with sorrow that we announce the death of three most loyal long-time members of EANA: Dr. H. Harris, New York City, at his summer camp in the Adirondacks; Miss Grace Randolph, St. Petersburg, Fla., at her home; Tom Robbins, Steep Falls, Me., at a Veterans Hospital.

J. Archie Johnson, Jr., Savannah, Ga., promotes Esperanto successfully in various ways: An excellent letter to the editor of "The Morning News" entitled "*Esperanto is Urged as World Language*"; a feature article by Mary K. Floyd, inspired by Mr. Johnson's activities, entitled "*At Least One Savannahian Can Speak a New Language*"; and a live television broadcast on Station WSAV, August 24th. These and other promotional activities are the sort which bring results for Esperanto.

The Duodecimal Society of America, 20 Carlton Place, Staten Island 4, N.Y., under the direction of Ralph H. Beard, constantly increases its interest in Esperanto, and plans further Esperanto literature.

William P. Vathis, employed in the Consular Service of the USA, paid the Central Office a visit in October on his way to his new post in Genoa, Italy. "Bill" served in Benghazi, Libya, during the past two years. He hopes to find a greater number of Esperantists in Italy.

Rev. Robert Sparks is back in the United States after serving in the Education Department in Zanzibar, East Africa, last year. He organized a class in Esperanto while teaching in the schools of Zanzibar.

New Esperanto Classes in the New York Area: In addition to Dr. Julius Balbin's classes mentioned elsewhere in this issue, Richard Ranc is teaching Esperanto at the Adult Education Center, Levittown, L.I. And Doris T. Connor is teaching by the famed Cseh Method at the Adult Education Center, Bryant High School, Queens. Mrs. Connor has received an official license from the Board of Education to teach in the Adult Schools.

Note re Edinburgh Dictionary: This excellent bound pocket dictionary 288 pages, Esp-Eng and Eng-Esp, now sells at \$1.00 from EANA. The cost of Edinburgh elsewhere is *more* than that, since raise by publisher.

Dr. Julius Balbin, New York City, is Assistant Professor of Russian and French at the U. S. Merchant Marine Academy at Kings Point. He was active in Esperanto some years ago in Poland, but has only recently renewed his interest and joined EANA. Already he has organized two good classes in Esperanto — one for Merchant Marines and one for a remarkable group in New York known as "The Polyglots." A combined meeting of *The Polyglots* with the *Esperanto Society of New York* was held at the McBurney YMCA in New York on Sunday afternoon, Oct. 23. The program began with Dr. Balbin's lesson in Esperanto for the Polyglots, followed by Doris T. Connor's Cseh Method demonstration in Esperanto. Then Dr. Tosihide Kuwahara, eminent Japanese scientist, Director of the State Industrial Research Institute, Osaka, Japan, showed beautiful colored slides of Japan scenes, speaking in Esperanto and translated in English by Mr. Connor. Dr. Kuwahara is traveling around the world, using Esperanto in all lands. The enjoyable afternoon closed with operatic and folk songs by Halina Nadi, formerly with the Polish Opera, — a grand finale. There were some 70 persons in attendance.

EANA HONOR ROLL, 1959-1960

Sincere appreciation and grateful thanks to the following members of EANA, who by their monthly, yearly, or special contributions have greatly aided the work of the Association during the years 1959 and 1960. The new Library Fund has also benefited from the interested support of many members. Thus EANA adds to its Honor Roll the names of those members who have contributed substantial sums, \$10 or more, to help this effort. (If by chance some name has been inadvertently omitted, please do not hesitate to inform the Central Office, so they may correct any omissions.)

Members of the Sustaining Board

Ralph H. Beard	Dr. Lee-Min Han	Bertha E. Mullin
Dr. Luella K. Beecher	Austin Herschel	Andrew O'Reilly
John M. Brewer	Allan Hutcheon	Harold S. Sloan
A. M. Brya	J. Archie Johnson, Jr.	Bertha F. Sloan
C.C.Cummingsmith	Paul J. Kovar	Dr. W. Solzbacher

Patron Members

Angela Alfaroli	Edwin R. Fleming	Rita B. Martinez
J. Z. Augustinius	Mr. & Mrs. J. Gamba	Rev. R. Marzilli
George W. Bailey	Jacques Gaucher	Mr. & Mrs. M. E. Muttart
Margaret L. Barkley	Emma Graf	Abraham H. Okun
Walter R. Beachy	Frank X. Graser	C. Stanley Otto
Eugene M. Beck	John C. Graves	David W. Peacock
Mrs. Albert Berney	Allan Greene	Orlie Pell
Rev. Whipple Bishop	John P.A. Greenwood	Lois Petry
Edward Blekicki	Jean-Guy Guay	Bruce K. Pierce
Gerald & Alice Boulet	Lou Harrison	D. W. Pittman
Allen L. Brown	George Hirsch	Grace Randolph
Vern Bruder	Noble Holderread	James F. Rettger
J. H. Casto	Mr. & Mrs. J. Hutchens	Nina W. Rivers
J. Leo Chapman	Rubey D.P. Kelber	Rev. Antonio Sandro
A. B. Coigne	Mr. & Mrs. T. Knudsen	Herbert W. Smart
Reginald H. Colley	Russell R. Lambert	Isabel P. Snelgrove
Doris T. Connor	Paul Larose	Juraj Sobota
G. Alan Connor	Anton Lenhardt	James V. Sorrel
Connie Davis	Fred H. McMann	Mr. & Mrs. W. P. Vathis
Richard L. Denison	Marie Maffey	E. L. Wells, Jr.
H. E. Dillinger	Dr. George A. Maggio	F. Lee York
David B. Ericson	Eulalia E. Marks	Elsie Yunghans
Sgt. James C. Faughnan	Mary Marrett	Pauline Ziobro

Donors to American Library Fund

Angela Alfaroli	Esperanto Soc. of N. Y.	Allan Hutcheon.
A. M. Brya	Edwin R. Fleming	Archie Nixon
Gerald Boulet	Lou Harrison	A. H. Okun
J. H. Casto	Austin Herschel	C. Stanley Otto
C. C. Cummingsmith		

Donors of 10 Gift Subscriptions to Libraries

George W. Bailey, Jr.	A. M. Brya	J. J. Hutchens
Jewel Bainbridge	Vern Bruder	Thomas O'Neill
Dr. Luella K. Beecher	C. C. Cummingsmith	Andrew Rogus
		Herbert Smart

KANTO PRI HIAVATA

Henry W. Longfellow

Tr. Ernest G. Dodge

(En ĉi tiu numero ni daŭrigas la poemon, kiu komenciĝis en AE, N-ro 2, 1960.)

Kanto III

Infaneco de Hiavata

Suben tra l' vesperkrepusko
En la tagoj forgesitaj,
En nememoreblaj tempoj,
Falis de la lun' Nokomis,
Falis bela ŝi, Nokomis,
Jam edzino, ne patrino.

Tie estis ŝi ludanta
Kun virinoj kunulinoj
Svinge en svingila sporto,
Svingis per vinbertrunketo,
Kiam rivalino ŝia
Pro envio kaj malamo
Dise tranĉis la svingilon,
Tranĉis la torditajn tigojn.
Time falis do Nokomis
Suben tra l' vesperkrepusko,
Sur herbejon, Muskodejo,
Sur la floroplenan stepon.
"Stelo falas!" oni diris,
"El ĉielo, jen steleto!"

Inter muskoj kaj filikoj,
Inter la lilioj stepaj,
Sur herbejo, Muskodejo,
Sub lunlumo kaj stellumo,
Naskis ŝi filinon belan;
Kaj ŝi nomis ŝin Venonah,
La unuan naskitinin.
La filino de Nokomis
Kreskis kiel la lilioj,
Kreskis alta kaj gracila
Kun beleco de l' lunlumo,
Kun beleco de la steloj.

Kaj Nokomis ŝin avertis
Oftadire, oftavorte,
"Gardu vin de Muĝekivis,
Vento de la Okcidento.
Ne aŭskultu liajn dirojn;
Vi ne kuŝu sur herbejo,
En lilioj vin ne klinu,
Por ke Vento Okcidenta
Vin ne trovu, ne mistraktu."

Sed Venonah ne atentis,
Ne obeis la averton,
Saĝodirojn ne atentis;
Kaj la Okcidenta Vento
Venis en vesperkrepusko,


Tuŝe sur la stepo marŝis,
Flustris al folioj, floroj,
Kurbigante florojn, herbojn,
Trovis, ke Venonah bela
En lilioj kuŝripozis,
Amindumis ŝin molmilde,
Amindumis ŝin per vortoj
De dolteco, per karesoj,
Ĝis ŝi fine en doloro
Naskis filon, naskis idon
En koramo sed malĝojo.

Do naskiĝis Hiavata,
Infaneto tre mirinda;
Sed patrino lia milda,
Ŝi, idino de Nokomis,
Mortis en angoro tie,
Korrompите, forlasita
De la Okcidenta Vento,
De l' perfida, falsedira
Senkorulo, Muĝekivis.

Pri filino, pri Venonah
Ploris kun dolor' Nokomis,
Ploris ŝi kun laŭta veo.
"Ho, ke estus mi mortinta,
Estus mi kun vi en morto,
Kie ne plu peno, veo!
Vahonovin! Veo mia!"

Ĉe la rand' de Ĝiĉe-Gumi,
Ĉe la brila Grandmar-Akvo,
La vigvamo de Nokomis,
La filino de la Luno,
Staris nigre kaj nubombre,
Staris inter la pinarboj
Kaj la trunkoj de abioj.
Hela ĉe ĝi akvo ondis,
Ondis klara, sunlumita,
Ondis brila Grandmar-Akvo.

Tie vartis lin Nokomis,
Sulkigita kaj maljuna,
Vartis etan Hiavata'n,
Svingis lin en lulileto,
Mola pro la muskoj, junkoj,
Firmbindita per tendenoj
De la cervo, la boaco;
Lian ploron ŝi forlulis:
"Psst! la Nuda Urso aŭdos!"
Endormigis lin kantante:
"Fŭa-jej! strigeto mia!"



Kiu estas la etulo
Lumiganta la vigvamon
Per okuloj grandaj siaj?
Eŭa-jej! strigeto mia!"

Instruadis lin Nokomis
Pri la steloj sur ĉielo,
Kaj pri Iŝkudah', kometo,
Iŝkudah' kun fajraj haroj;
Montris eĉ la Morto-Dancon
De l' spiritoj kun la klaboroj
Kaj la plumaj kapornamoj,
Nordflamantaj en la vintro;
Montris ĉielvojon blankan,
Vojon de fantomoj, ombroj,
Strion rektan trans ĉielo,
Plenan de fantomoj, ombroj.

Ĉe la pord' somervespere
Sidis eta Hiavata,
Aŭdis de pinarboj flustron,
Aŭdis de la akvoj plaŭdon,
Sonojn de muziko, miro:
"Minne-vava!" diris arboj,
"Mudvej-aŭŝka!" diris akvoj.

Vidis li la flugetantan
Lampireton, Vah-vah-tejsi,
Dum krepusko de vespero,
Kies kandleto lumis
En filikoj kaj arbustoj.
Kantis li infanan kanton,
Instruite de Nokomis:
"Vah-vah-tejsi, lampireto,
Fluginsekto blankfajrhava,
Dancetanta blankfajrulo,
Min lumigu per kandelo,
Antaŭ ol mi kuŝos lite,
Antaŭ dorma okulfermo!"

Vidis li la lunon ronde
Supreniri el la akvo,
Vidis en ĝi ombroformojn;
Flustris: "Kio ĝi, Nokomis?"
Kaj Nokomis al li diris:
"Foje batalul' kolere
La avinon prenis, ĵetis
En ĉielon noktomeze;
En la lunon ŝin li ĵetis;
Ŝian korpon jen vi vidas."

Vidis li la ĉielarkon
En ĉielo orienta,
Flustris: "Kio ĝi, Nokomis?"
Kaj Nokomis milde diris:
"Tio estas la ĉielo
De la floroj, nun vi vidas.
Ĉiuj floroj de l' arbaro
Kaj lilioj de la stepo
Post velkado sur la tero

Ree floras en ĉielo."

Aŭdis li meznokte strigojn,
Ululantaj en arbaro.
"Kio?" li ekkriis time,
"Kio estas ĝi, Nokomis?"
Kaj Nokomis varte diris:
"Nur la strigo kaj strigeto
En la lingvo sia propra
Diskutante reciproke."

La etulo Hiavata
Lernis lingvojn de la birdoj,
Nomojn kaj sekretojn lernis,
Kiel ili nestfaradas,
Kie sin en vintro kaŝas,
Kaj parolis li kun ili,
Nomis ĉiun el la birdoj
"Kokidet' de Hiavata."

Kaj de ĉiaj bestoj lernis
Li la lingvon kaj sekretojn;
Kiel la kastoroj lerte
La loĝejojn konstruadas;
Kiel la sciuroj saĝe
Kaŝas glanojn por la vintro;
Kial la boacoj kuras
Tiel vikle kaj rapide;
Kial la kuniklo estas
Tiel milda kaj timema.
Renkontante sur la vojo,
Li kun ili babiladis:
"Fratoj vi de Hiavata."

Nun Iagu, rakontulo,
Ega fanfaronemulo,
Vojaĝanto, babilanto,
Li, amiko de Nokomis,
Lerte faris jen pafarkon,
Donis ĝin al Hiavata.
El frakseno ĝin li faris,
El la kverko faris sagojn,
El siliko ties pintojn,
Kaj el plumoj direktilojn.
Ŝnuron havis la pafarko
El la haŭto de la cervo.

Diris li al Hiavata:
"Filo, iru en arbaron,
Kie ruĝaj cervoj gregas;
Pafu por ni cervoreĝon,
Pafu la branĉkornan cervon."

Tuj for en la arbaron
Sola paŝis Hiavata
Kun pafarko kaj la sagoj.
Ĉirkaŭ li la birdoj kantis:
"Nin ne pafu, Hiavata!"
Kantis turdo, la Opeĉi,
Kaj Ovajsa, birdo blua:
"Nin ne pafu, Hiavata!"



Sur la kverkon vigle saltis
La sciuro, Agidaŭmo,
Saltis li de branĉ' al branĉo,
Tusis kaj balbutis ride,
El kverkarbo ride kriis:
"Min ne pafu, Hiavata!"

Pretervoje la kuniklo
Flankensaltis, malapude
Sidis rekta sur la koksoj;
Duontime, duonŝerce
Diris al la ĉasanteto:
"Min ne pafu, Hiavata!"

Malatenta, li ne aŭdis,
Pensis nur pri ruĝa cervo;
Piedsignojn li rigardis,
Kiuj montris al rivero,
Al rivera transvadejo.
Kvazaŭ dorme li paŝadis.

Sin kaŝinte inter alnoj,
Li atendis la vircervon,
Ĝis li vidis kornobranĉojn,
Du okulojn en densejo,
Du naztruojn ventoflarajn.
Cervo jen eniris vojon
Makulitan sune, ombre.
En la brust' de Hiavata
Batis lia kor' tremante
Kiel foliar' ĉirkaŭa,
Trema foliar' betula.
Cervo paŝis laŭ la vojo!

Sur genuo apogante,
Li direktis unu sagon
Sen moviĝo de branĉeto,
Sen ekflustro de folio;
Sed ekhaltis la vircervo,
Kaj kvarhufe piedfrapis,
Kun levita huf' aŭskultis,
Saltis, kvazaŭ sag-renkonte;
Ha! mortiga, sibla sago,
Kiel vespo lin ĝi pikis!

Morta kuŝis la vircervo
Ĉe rivera transvadejo,
Ne plu batis tima koro;
Sed la kor' de Hiavata
Saltis, kantis, ĝoje batis
Dum li hejmen ŝultre portis
Ruĝan cervon kornohavan.
Kaj Iagu kaj Nokomis
Bonvenigis lin aplaŭde.

El la haŭto de la cervo
Manteleton nun Nokomis
Lerte faris por la knabo.
El la karno de la cervo
Faris ŝi festenan manĝon,
Feston je honoro lia.

Vilaĝanoj venis, festis,
Ĉiuj laŭdis Hiavata'n.
Nomis lin la Son-ge-taha,
Ulo de la Forta Koro!
Nomis lin la Mahn-go-tejsi,
Koro de Kolimbo-Birdo!

Kanto IV

Hiavata kaj Muĝekivis

El knabeco al viraĝo
Kreskis nia Hiavata;
Lerta li en ĉaso-arto
Kaj saĝec' de maljunuloj,
En la sportoj de junuloj
Kaj virecaj artlaboroj.
Li rapid-pieda estis,
Povis pafi sagon foren,
Tiam kuri tiel vigle
Ke la sag' post dorso falis!
Brake forta li ja estis,
Povis pafi sagojn supren,
Sagojn dek, rapide tiel,
Ke la deka jam ekflugis
Antaŭ ol l' unua falis!

Pugnogantojn li posedis,
Mingekahvun, el cervhaŭto,
Pugnogantojn de magio.
Kiam ilin li manportis,
Povis li frakasi rokojn
Kaj mueli ĝis pulvoro.
Mokasenojn por piedoj
Havis li el cervohaŭto,
Mokasenojn sorĉigitajn.
Kiam li ĉe maleoloj
Ligis ilin, portis ilin,
Ĉiu paŝo mejlo estis!

Li demandis de Nokomis
Pri la patro, Muĝekivis;
Kaj de ŝi, maljunulino,
Lernis li la fi-sekreton
Pri beleco de l' patrino,
Pri perfido de la patro;
Lia kor' en brusto brulis,
Kiel fajropeco brulis.

Al Nokomis li deklaris:
"Iros mi al Muĝekivis,
Lernos kiel patro fartas
Ĉe l' pordegoj Okcidentaj,
Pordoj de la Sunsubiro."

El loĝejo for li iris
En kostumo por vojaĝo,
Kun armiloj por ĉasado,
Kun ĉemizo kaj gamaŝoj
El cervhaŭto, kongarnitaj;
Sur la kapo agloplumoj;



Ĉirkaŭ la talio portis
 Vampum-zonon el konkpecoj,
 En la manoj, la pafarko
 Kun la ŝnuro cervtendeno;
 En sagujo, kverkaj sagoj,
 Ŝtonopintaj, plumohavaj.
 Portis li la pugnogantojn,
 Mingekahvun, la magiajn,
 Ankaŭ mokasenojn sorĉajn.

Sed averte lin Nokomis,
 La maljunulin', detenis:
 "Ne foriru, Hiavata,
 Al la Vento Okcidenta,
 Regno ĝi de Muĝekivis,
 Por ke vin li per magio
 Ne mistraktu, ne mortigu."

Sed sentima Hiavata
 Ne atentis la averton
 De virino, de Nokomis.
 Li ekmarŝis en arbaron;
 Ĉiu paŝo, mejlo estis;
 Aĉa la ĉiel' aspektis,
 Aĉa sub pied', la tero;
 Atmosfer' sufoke premis,
 Plena de haladz' kaj fumo,
 Kvazaŭ el arbar' brulanta,
 Ĉar la kor' en brusto brulis,
 Kiel fajropeco brulis.

Okcidenten, okcidenten
 Do vojaĝis Hiavata,
 Dorse lasis plej rapidajn
 Cervojn kaj la antilopojn,
 Trans la flua Eskonaba,
 Trans la larĝa Misisipi,
 Tra la montoj de la stepo,
 Tra la lando de la triboj
 Korvoj, Vulpoj, kaj loĝloko
 De la Nigrapieduloj;
 Venis al la Rokaj Montoj,
 Al la regno sunsubira
 De la Okcidenta Vento.
 Tie, sur ventplenaj pintoj,
 Sidis praa Muĝekivis,
 Reĝo de l' ĉieloventoj.

Forte miris Hiavata
 Pri aspekto de la patro.
 Ĉirkaŭ li, aer' sovaĝe
 Skuis lian nubhararon;
 Kiel neĝo la hararo,
 Brilis kiel la kometo,
 Kiel Iskudah', kometo,
 Kiel stelo fajtharara.

Ĝojis multe Muĝekivis
 Ekvidinte Hiavata'n;
 Vidis sian junan aĝon



En vizaĝ' de Hiavata;
 Vidis belon de Venonah
 El la tombo reaperi.

"Ha! bonvenon, Hiavata,
 Al la regno Okcidenta!
 Longe vin mi atendadis!
 Junuleco estas bela;
 Maljuneco tre soleca.
 Junuleco estas fajra;
 Maljuneco estas frosta.
 Miajn tagojn forpasintajn
 Vi al mi reportas pense,
 Vi reportas de l' juneco
 La pasion por Venonah!"

Multajn tagojn ili kune
 Babiladis, demandadis,
 Atendante, respondante.
 Kaj la forta Muĝekivis
 Fanfaronis siajn agojn,
 Siajn aventur-danĝerojn,
 Sian nevenkeblan bravon,
 Sian korpon nevundeblan.

Pacience Hiavata
 Sidis dum la fanfarono,
 Kun rideto aŭskultadis,
 Ne kontraŭis, ne minacis,
 Sin per vorto ne perfidis.
 Sed la kor' en brusto brulis,
 Kiel fajropeco brulis.

Tiam diris: "Muĝekivis,
 Ĉu ekzistas ja nenio
 Kio povus vin detrui;
 Povus kaŭzi al vi timon?"
 Kaj la forta Muĝekivis,
 Tre afable fanfarone
 Diris: "Estas ja nenio
 Krom la jena nigra roko,
 La fatala jena Vaŭbik!"

Li rigardis Hiavata'n
 Kun bonkora saĝaspekto,
 Kun vizaĝo de patreco,
 Kun fiero pro la belo
 De la altgracila korpo;
 Kaj li diris: "Hiavata,
 Nu ja, ĉu ekzistas io,
 Kio povus vin detrui,
 Povus kaŭzi al vi timon?"

Sed singarde Hiavata
 Restis muta, kvazaŭ dube,
 Kvazaŭ en necerta penso.
 Tiam: "Estas ja nenio
 Kun escepto de Apukva,
 Jena granda junko-herbo!"

Kiam Muĝekivis stare,
 Gestis kvazaŭ por eltiri

El la grundo la junkherbon
 Hiavata time kriis:
 "Kago! kago! Ĝin ne tuŝu!"
 "Ha, do," diris Muĝekivis,
 "Certe ne, mi ĝin ne tuŝos!"

Tiam pri aliaj temoj
 Ili daŭre babiladis;
 Pri la fratoj de l' junulo;
 Pri Vabun', Matena Vento;
 Pri la Suda, Ŝavondasi;
 Pri Kabibonoka, Norda;
 Pri l' patrin' de Hiavata,
 Ŝi, la belulin', Venonah;
 Kiel ŝi sur step' naskiĝis,
 Kaj pri ŝia morto, laŭ la
 Rakontado de Nokomis.

Kaj li kriis: "Muĝekivis!
 Vi la mortiginto estas!
 Ŝian belon kaj junecon
 Prenis vi, kaj prene rompis
 La Lilion de la Stepo,
 Piedpremis ĝin – Venonah!
 Nun konfesu! nun konfesu!"
 Kaj la forta Muĝekivis
 Flirtis vete la hararon,
 En angoro kapon klinis,
 Kapon grize blankan klinis,
 En silenta mov' de jeso.

Jen eksaltis Hiavata
 Kun minaca brovo, gesto,
 Metis manon sur la Vaŭbik,
 Sur la egan nigran rokon;
 Per la sorĉaj pugnogantoj,
 Mingekahvun, la magiaj,
 Rompis li la rokkrutaĵon,
 Ĝin muelis ĝis pecetoj,
 Ĵetis ilin tre sovaĝe
 Al la patro, Muĝekivis,
 Al la patro, pente trista;
 Ĉar la kor' en brusto brulis,
 Kiel fajropeco brulis.

Sed la reĝo, Muĝekivis,
 De la Okcidenta Vento
 Blovis la ŝtonpecojn foren,
 Per spirado de naztruoj,
 Per la ŝtormo de kolerio,
 Reen al la atakanto;
 Prenis junkon, la Apukva,
 Tiris ĝin kun la radikoj
 El la bordo de l' herbejo,
 El la koto grandan junkon.
 Mokridadis Hiavata!

Tiel la batal' ekiĝis,
 Man' ĉe mano en la montoj.
 El nestego kriis aglo,

La Keneŭ, militoaglo,
 De sidloko sur krutaĵo
 Flugis super la batalo.

Kiel arbo en ŝtormego
 Vipfleksiĝis Granda Junko;
 Kaj en pezaj, grandaj pecoj
 Falis la fatala Vaŭbik,
 Ĝis la ter' bruege tremis
 Pro konfuzo de l' batalo;
 Ĝis aer' fariĝis plena
 De kriego, de hurlado;
 Ĝis la tondro el la montoj
 Reĥadis, "Baim-vava!"

Retiriĝis Muĝekivis,
 Okcidenten rapidegis,
 Stumble tra la montoj kuris,
 Dum tri tagoj retiriĝis.
 Hiavata venĝe sekvis
 Ĝis la pordoj de la Vento
 Okcidenta, – Sunsubiro,
 Ĝis plejlasta tero-limo
 En malplenaj vastaj spacoj,
 Kie sin kuŝigas suno,
 Kiel nokte la flamingo
 Sin kuŝigas en la nesto
 En solecaj, mornaj marĉoj.

"Ĉesu!" kriis Muĝekivis,
 "Ĉesu, filo, Hiavata!
 Vi ne povas min mortigi.
 Senmortul' ne povas morti.
 Mi submetis vin je provo
 Por ekkoni vian bravon,
 Por elpruvi la kuraĝon;
 Nun ricevu bravkompenson!

"Hejmeniru al popolo;
 Inter ili nun vivadu,
 Inter ili laboradu.
 De l' malbon' purigu teron,
 Fiŝkaptejojn kaj riverojn;
 Ĉiajn monstrojn kaj sorĉistojn
 Senvivigu kaj mortigu,
 La gigantojn, la Vendigoj,
 La serpentojn, Kenabikoj,
 Kiel mi mortigis Urson
 Miŝe-Mokva, sur la montoj.

"Kaj ĉe vivofino, kiam
 Morto al vi apudiĝos,
 Kaj teruraj fiokuloj
 De la Paŭguk vin rigardos,
 Mi dividos mian regnon,
 Donos al vi regnoparton.
 La reganto vi fariĝos
 De l' Nord-Okcidenta Vento.
 De l' hejm-vento, la Kivejdin."
 Tiel la batalo fama



Okazigis en teruraj
 Tagoj foraj de la Ŝah-ŝah,
 En la tagoj forpasintaj,
 En la regno Okcidenta.
 Eĉ nuntempe la ĉasisto
 Vidas signojn de l' batalo
 Inter montoj, en la valoj,
 Vidas la gigantan junkon
 Ĉe lagetoj kaj fluejoj,
 Vidas pecojn de la Vaŭbik
 Nun kuŝantaj en la valoj.

Hejmeniris Hiavata;
 Plaĉa estis la pejzaĝo,
 Plaĉa la aero supre;
 Ĉar maldolĉo de kolero
 Estis tute forigita;
 El la cerbo venĝopensoj
 Estis plene forpelitaj,
 Brula febro for de l' koro.

Unu fojon nur survoje
 Paŭzis li aŭ malrapidis,
 Haltis por aĉeti sagojn
 Ĉe Sagfabrikisto fama
 En la lando de l' Dakotoj,
 Kie akvofal' belega,
 La Kaskado Minehaha,
 Brilbriletas inter kverkoj,
 Ridias, saltas en valton.

Tie el la sabloŝtono,
 Aŭ kalcedoni' malmola,
 La Sagfabrikisto fama
 Estis dum la multaj jaroj
 Fabrikanta sagopintojn,
 Aŭ el jaspo, aŭ siliko,
 Faris ilin akrarantaj,
 Poluritaj, altaprezaj.

Kun li loĝis la filino,
 Ja kaprica same kiel



La Kaskado, Minehaha,
 Kun humoroj sunaj, ombraj,
 Kun okuloj brune nigraj,
 Jen ridetaj, jen spitemaj;
 Paŝoj tiel rapidega
 Kiel la rivero, haroj
 Fluas kiel la kaskado,
 Rido ŝia tre muzika.
 Li de akvofalo prenis
 Nomon por ŝi Minehaha,
 Nomis ŝin Ridanta Akvo.

Ĉu do por aĉeti sagojn,
 Sagopintojn el siliko,
 Jaspo aŭ kalcedonio,
 Paŭzis tiam Hiavata
 En la lando de l' Dakotoj?

Ĉu ne por knabinon vidi,
 Trajtojn de Ridanta Akvo
 De malantaŭ la kurteno
 Ŝtelmontrantaj sin? Por aŭdi
 Ŝiajn vestojn susurantaj,
 La kurtenon movetantaj?
 Same ja la Minehaha
 Brilvidiĝas tra la branĉoj,
 Kaj ridantan akvon oni
 Aŭdas tra la branĉkurteno.

Kiu povas ja konstati
 Pensojn kaj viziojn de la
 Bravjunuloj fajrocerbaj?
 Kiu revojn pri beleco
 En la kor' de Hiavata?
 Al Nokomis li rakontis,
 Ĉe vigvam' je sunsubiro,
 Nur renkonton kun la patro,
 Nur la bataladon akran
 Kontraŭ Muĝekivis, sed ne
 Unu vorton pri sagpintoj,
 Kaj nek pri Ridanta Akvo.

DEZIRAS KORESPONDI

- Usono.* D-ro Julio Balbin, 340 Riverside Dr., New York 25, N. Y., lingvo-instruisto kaj tradukisto, dez. kor. kun gesamideanoj tutmonde, serioze pri literaturo, muziko, arto, kaj problemoj de internacia kompreno.
- Usono.* S-ro William I. Ivey, 116 Cook St., Ithaca, N. Y., universitata studento, 20-j., Esp. komencanto, dez. kor. kun gejunuloj samaĝaj en ĉiuj landoj, pri studo de lingvoj kaj problemoj de interkomunikado.
- Usono.* S-ro A.H.Okun, 162 Broadway, Monticello, N. Y., dez. kor. per PK kun seriozaj gesamideanoj, Eŭropo, Israelo, Oriento, Afriko, kaj Sud-Ameriko, pri mond-paco, arto, muziko, k. t. p. Certe respondos.
- Usono.* (Soldato en Poitiers, France.) SFC Sheridan Wilson, A.S.N., R.A. 38569642, 279th Army Band, A.P.O. 44, New York, N.Y., dez. kor. kun gesamideanoj kiuj havas intereson pri la Biblio aŭ fotografio.
- Usono.* S-ro Haroo Uchida, 1337 R Street, Lincoln 8, Nebr. Japana studento en usona universitato jam dum 3 jaroj, pretiĝas por labori en Sud-Ameriko. Dez. kor. kun Espistoj en S. A. kaj en ĉiuj landoj.

"SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

Tells You What to Say and How to Say it!

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5 ¼ x 3 ½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

It is a thoughtful, useful gift for friends, too!

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.

Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.



only
75¢

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.